

27a jarkolekto - junio 2006/6

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Lingvaj problemoj  
en Germanio**

**Negro iĝis nigrulo**

**La okcitana  
lingvo**

# Stefan Maul

## El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustajoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# Germana batalo

5

En Germanio dum pluraj jaroj okazas vigla diskutado pri la lingvo, unue pri mise proponita ortografia reformo, kaj nun pri la graveco de la lingvo mem. Aktuale diskutado temas pri uzado –pli ĝuste ne-uzado – de la germana fare de enmigrintoj.



# 11 Negro iĝis nigrulo

Mikela ne havis grandan sperton pri negroj. Ŝi ŝanceliĝis inter du kontraŭaj skoloj: unuaflanke la patrino, de ĉiam ligita al dekstreca movado, daŭre furiozis kontraŭ „tiuj simioj, kiuj venas por ŝteli nian laboron kaj perforti nin virinojn”; duaflanke la ĉiutaga socia sperto.



# La okcitana lingvo 14

Plorinde estas tro malfrue por la okcitana lingvo. Klopodu ni protekti la aliajn eŭropajn lingvojn fronte al la angla. Ĉi-momente estas nur la unua etapo. Kun kolektiva konscio ĉi-momente ankoraŭ eblas haltigi tiun evoluon. Ĉu vi volas ke, post jarcento, oni parolu nur la francan en la lokoj, kie oni hodiaŭ daŭre parolas la okcitanan?



# 19 Ŝtato, eklezio kaj „ideologia laikeco”

Ne pasas tago, en epoko de referendumo pri la brua temo rilate embrian homan vivon, sen ke, en martela insisto en Italio, politikistoj aŭ intelektuloj sin sentas devigataj hororigite rimarki, kiel la katolika eklezio senrajte enmiksiĝas, per la tuta pezo de sia aŭtoritateco, en aferojn, kiuj konsistucie ne apartenas al ĝia kompetento-sfero.

## POLITIKO

Niĝerio ..... 8  
Kiom da... disputoj?

Privateco ..... 8  
Gvatanto gvatata

## MODERNA VIVO

Albanio ..... 9  
Paca ŝlosilo

Pagana Tirano

Albanoj ..... 9  
Eksterlande eminentaj

Togolando ..... 10  
Konfuzo kaj kontraŭdiroj

Sano ..... 10  
Prezidi la propran psikon

## NOVELO

Negro iĝis nigrulo ..... 11

## EKONOMIO

Madagaskaro ..... 13  
Kontraŭleĝa kopiado

## LINGVO

Eseo ..... 14  
La okcitana lingvo

## ESEO

Ŝtato, eklezio kaj „ideologia laikeco” ..... 19

## LIBROJ

Historio sen vualo de mitoj ..... 22

Rakontoj neniam perdontaj sian identecon ..... 23

Mitologiaĵo tre bele transdonita ..... 24

## HOBIO

Litovio ..... 25  
Estiĝi la plej alta

## ENIGMO

Pliaj sudoko-enigmoj ..... 26

Abonoj ..... 4

Enkonduko ..... 5

Leteroj ..... 6

El mia vidpunkto ..... 7

Anoncetoj ..... 27

# Kiel pagi vian abonon de MONATO?

## ► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be) (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalio	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

## ► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: [esperfed@ans.com.au](mailto:esperfed@ans.com.au).
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: [leopold.patek@esperanto.at](mailto:leopold.patek@esperanto.at).
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: [davidekelso@yahoo.co.uk](mailto:davidekelso@yahoo.co.uk)
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz).
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: [virveernits@hotmail.ee](mailto:virveernits@hotmail.ee).
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: [eafofficejo@esperanto.fi](mailto:eafofficejo@esperanto.fi)
- **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: [esperanto-france@esperanto.org](mailto:esperanto-france@esperanto.org).
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: [s.h.maul@t-online.de](mailto:s.h.maul@t-online.de).
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de).
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: [wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de](mailto:wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de)
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: [abonasoft@gmail.com](mailto:abonasoft@gmail.com).
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: [noviresp@eircom.net](mailto:noviresp@eircom.net).
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: [esperant@ismennt.is](mailto:esperant@ismennt.is).
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: [f.esp.it@infinito.it](mailto:f.esp.it@infinito.it).
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: [kleg@mvf.biglobe.ne.jp](mailto:kleg@mvf.biglobe.ne.jp).
- **Japano Esperanto-Instituto,** Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: [iwoleskatl@shaw.ca](mailto:iwoleskatl@shaw.ca).
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: [esperant@unitel.co.kr](mailto:esperant@unitel.co.kr)
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: [miauguau@racsa.co.cr](mailto:miauguau@racsa.co.cr)
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: [mbeLOSEV@public.srce.hr](mailto:mbeLOSEV@public.srce.hr).
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: [Margarita@rsu.lv](mailto:Margarita@rsu.lv).
- **Litova:** Laimius Straznickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: [stralaim@takas.lt](mailto:stralaim@takas.lt).
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: [esper\\_lu@geocities.com](mailto:esper_lu@geocities.com).
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: [inform@esperanto.no](mailto:inform@esperanto.no).
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz).
- **Pola:** Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net).
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: [mikaelo@km.ru](mailto:mikaelo@km.ru).
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: [cbeckford@telkomsa.net](mailto:cbeckford@telkomsa.net).
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: [persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com](mailto:persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com).
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com).
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org)
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: [peterjaimez@tutopia.com](mailto:peterjaimez@tutopia.com).



# Lingvaj problemoj

En mia loĝurbo Augsburg policanoj lernis la rusan lingvon, por ke ili povu pli bone interkomuniki kun rus-germanoj, kiuj amase vivas tie ĉi sed nur malamase scias kaj lernas la germanan. Renversita mondo? Ne, sed tio necesas por sekurigi la urbon. Ĉar turkoj jam de multaj jardekoj vivas en Augsburg, la polico disponas jam pri sufiĉe da turkdevenaj kolegoj, do pri tiu grupo de enmigrintoj oni ne havas lingvajn problemojn. Kelkaj politikistoj ĵus proponis, ke oni prezentu turkan version de l' germana nacia himno, por ke ankaŭ turkoj povu kanti ĝin – tio helpos integriĝi, argumentis verdula politikisto, ĉar estos „simbolo por multlingveco de Germanio”. Sed kristandemokrata politikisto objektis: „Tio estus la malo de integriĝo.” La germanaj kandidatoj por la konkurso de eŭropaj televidioj pri kanzonoj prezentas jam de jaroj siajn kantojn ne en la germana, sed la angla lingvo. Preskaŭ neniu protestas. Protestoj tamen jen kaj jen aperas kontraŭ la „german-gla”. Kontraŭ superfluaj anglismoj nun agadas triopo da fakuloj pri germana lingvo. Precipe en reklamingvaĵo abundas tiaj monstraĵoj, tiel ke laŭ freŝaj esploroj ilin komprenas nur 8 % de la germanaj klientoj. Per ilia agado „Vivanta germana” ili volas proponi ĉiumonate tri germanigojn de anglismoj, ekzemple por *Homepage* (*Startseite* = startpaĝo).

Jen nur kelkaj facetoj el longa listo de lingvaj problemoj en Germanio. Sed preskaŭ ĉiuj germanoj favoras la anglan, lingvon de tutmondiĝo. Fervore oni lernas ĝin. 12-jara filo de konato tamen ne bone progresas en angla kurso de la lernejo kaj tial riskas ne atingi la pli altan klason. Do la patro sendis lin por unusemajna lingvokurso al Malto, por 1250 eŭroj. Imagu, se oni proponus al usona patro sendi sian filon al Germanio, por ke li pli bone lernu tiun lingvon. Li deklarus vin freneza. Kial lia filo lernu akcesoran, sensignifan lingvon, se li ja posedas la mondlingvon? Germanoj ne vidas tian maljustaĵon, tamen plendas pri malgraviĝo de sia lingvo. Pri tiu ĉi ambigua konduto vi povas legi en la ĉi-numera „vidpunkto”. Estus interese, ekscii de niaj legantoj, ĉu similajn lingvoproblemojn oni havas en aliaj landoj. Skribu!

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, menu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

### eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

### ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

### reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Schlafer.

### redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

### grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

### redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainicite. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna\_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14<sup>th</sup> St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita\_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

## Kiu prenis, *Fincorp* aŭ *MONATO*?

Sur la kovrilo de la februara *MONATO* estis bildo de viroj grim pantaj supren. Strange, tiu sama bildo aperis en reklamo de la firmao *Fincorp* en ĵurnalo en Sidnejo antaŭ nelonge. Ne estis klarigo pri la foto, nek en *MONATO*, nek en la reklampaĝo.

Margaret CHALDECOTT  
Aŭstralio



**Noto de la redakcio:** Tio, kion vi vidas en la kovrilo de la februara numero de *MONATO*, estas kataluna tradicio nomata „castellers” (hom-tur-istoj). La 10-etaĝa homturo estis sukcese plenumita de la homturistoj de la urbo Vilafranca del Penedès. Pluraj firmaoj bildigis siajn reklamojn per tiuj homturoj, ĉar ili estas klara montrilo de grupa laboro.



## Saĝa recenzanto

La recenzo pri *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito* (*MONATO* 2006/2, p. 24) estas tre saĝa. Mi miavice rekomendos tiun legendan libron al ĉiuj miaj konatoj en la mondo, kaj mi gratulas al la recenzanto kaj tradukinto.

Abbas MOMENI  
Irano

## Gratulojn al Maul

La artikolo *Satiro kaj realo* (*MONATO* 2006/5, p. 7) estas bonega artikolo! Gratulu sinjoron Maul miaflanke; mi ege ŝatas liajn opiniaĵojn!

Ferriol MACIP I BONET  
Katalunio

## Malapero de lingvoj

Lingvoj estingiĝas. Nuntempe sur la planedo oni parolas ĉirkaŭ 6800 lingvojn. Kaŭze de la merkatisma tutmondigo kun sekva superregado de la usonangla lingvo, 90 ĝis 95 elcentoj de tiu lingvaro estingiĝos ĝis la fino de la nuna jarcento. Jam hodiaŭ ĉesas esti parolataj averaĝe po dek lingvoj ĉiujare. La akceliĝanta fenomeno koncernas unualoke Afrikon kaj Azion, sed ankaŭ la aliajn kontinentojn, inkluzive Eŭropon. Ĉe ni ankoraŭ vivas 46 minoritataj lingvoj, parolataj de ĉirkaŭ 35 milionoj da personoj (esploro komisiita de la Eŭropa Komisiono al *Eurromosaic*).

Inter ili estas, ekzemple, la skotlanda gaela, la kornvala, la cimbra (okcidentgermana lingvo en norda Italio), la

romanĉa (en Svislando), la itala-hebrea: *italkian*. (Vidu: *UNESCO Red Book on Endangered Languages* (La ruĝa libro de Unesko pri endanĝerigitaj lingvoj), [www.helsinki.fi/~tasalmin/endangered.html](http://www.helsinki.fi/~tasalmin/endangered.html).) Ĉiu lingvo enhavas siajn proprajn kulturon, tradicion, pensmanieron. La lingvomalpliigo do kaŭzas malriĉigon ne nur antropologian, sed ankaŭ filozofian, logikan, etikan, historian. Je ĉiu estingiĝanta lingvo – ĉefe se ĝi ne posedas skriban tradicion – la kerna ideala/civila komplekso de unu popolo sinkas en la ombbron de la forgeso. Popolo, senigita de sia lingvo, perdas ankaŭ sian animon.

Filippo FRANCESCHI  
Italio

## Mi legis kaj relegis ...

Mi talegis kaj relegis kun granda interesiĝo la rakonton de Lin Shong *Forpasis mia karulino* (*MONATO* 2006/3, p. 12-13). Liaj travivaĵoj kaj suferoj lige kun la malsano de lia edzino kaj posta forpaso, liaj rezonadoj pri la amo de la geedzoj kaj la neceso esprimi ĝin tutsamas kiel la miaj, kvankam ni ambaŭ apartenas al malsamaj kulturoj kaj loĝas en landoj malproksimaj unu de la alia je dekmiloj da kilometroj. Mi skribas tion ĉi okaze de la sepjariĝo de ŝia forpaso je la 22a de aprilo. Lastatempe specialistoj pri la familia vivo, psikologoj kaj seksologoj en nia lando konsilas, ke geedzoj devas pli ofte esprimi siajn am- kaj dank-sentojn unu al la alia.

Dimitar HADJIEV  
Bulgario

## Kiel sendi viajn leterojn?



Sendu viajn leterojn por tiu ĉi rubriko al:

Flandra Esperanto-Ligo, *MONATO*  
Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen Belgio  
Telekopiilo: + 32 3 233 54 33.  
Retpoŝte: [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net)

Pri la enhavo de la leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redaktanto havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al aperintaj artikoloj havas prioritaton.

# Germana batalo

de Stefan MAUL

**E**n Germanio dum pluraj jaroj okazas vigla diskutado pri la lingvo, unue pri mise proponita ortografia reformo (kun nun fina rezulto, ke post multegaj kritikoj kaj oponoj oni enkondukas nur moderajn modifojn), kaj nun pri la graveco de la lingvo mem. La germana dum la unua parto de l' pasinta jarcento apud hispana, franca, angla kaj rusa estis inter la tiel nomitaj mondlingvoj; grava ĝi estis precipe en scienca sfero (ekzemple en medicino), sed pli kaj pli perdis signifon kaj definitive fariĝis malgrava sekve de la horora hitlera reĝimo kaj 2a mondmilito, kiun komencis nazia Germanio.

## Instru-neglekto

Aktuale diskutado (kiu foje iĝas disputado) temas pri uzado – pli ĝuste ne-uzado – de la germana fare de enmigrintoj, precipe kiam per diversaj esploroj, ekzemple la konataj PISA-studaĵoj, oni fine rimarkis, ke Germanio neglektis instruadon de la nacia lingvo al ne-germanaj infanoj, kio kaŭzas multajn problemojn en lernejoj kaj socio. En la du plej grandaj grupoj de enmigrintoj (kaj ties idoj), turka kaj rus-germana, eĉ en dua kaj tria generacio scio de la germana estas tiom rudimenta, ke infanoj fiaskas en lernejoj kaj junuloj neniel trovas laborpostenojn. Sekve de frustracio ili ne malofte pro manko de vivperspektivo ne nur enuas kaj huliganas, sed eĉ iĝas krimemaj.

## Instruista helpkrio

Kiam en printempo instruistoj de lernejo en Berlino publikigis helpkrian leteron al la koncerna ministrejo, per kiu ili klarigis, ke praktike ne eblas eduki siajn lernejanajn (precipe turkajn kaj arabajn) pro manko de lingvoscio, ekscitite reagis politikistoj kaj konstatis,

ke tiaj infanoj povas integriĝi en la socio nur, se ili scias la germanan. Iuj postulis, ke en lernejoj oni rajtu paroli nur germane, ne turke, ruse aŭ en alia „fremda” lingvo. Aliaj postulis, ke infanoj de enmigrintoj rajtu eniri lernejon nur, se ili scias la germanan. Sed kiel ili sciu ĝin, se en la familioj oni tute ne parolas la lingvon de la „gastlando”? Nur nun politikistoj ekkonis, ke pri tio kulpas manko en la eduka sistemo: frekventado de infanvartejo estas libervola en Germanio – kaj kosta (gepatroj devas pagi kotizon), sed frekventado de lernejo estas deviga kaj senpaga. Do gepatroj de enmigrintoj hezitas sendi siajn idojn al infanvartejo; kiam ili eniras lernejon, ili do scias tute ne aŭ nesufiĉe la germanan, por kompreni instruistojn.

## Favorata angla

Aliflanke en lernejoj oni pli kaj pli reduktadis instruadon de l' germana favore al – angla, kiun oni parte instruas jam en la unuaj klasoj de elementaj lernejoj kaj baldaŭ ankaŭ en infanvartejoj. Sekve ankaŭ abiturientoj ne plu bone regas sian gepatran lingvon, kiun en multaj fakoj studentoj eĉ ne plu bezonas, ĉar en universitatoj oni lekcias per la angla. Sciencistoj estas devigataj, perfekte scii tiun lingvon; eĉ la plej granda germana scienca akcel-organizaĵo DFG postulas skizon en la angla, se iu volas havi stipendion aŭ subvencion! Tial renomaj sciencistoj antaŭ unu jaro postulis redoni al la germana sian sciencon rangon. Ili argumentis, ke 30 % de la germanoj tute ne scias la anglan, pliaj 30 % nur rudimente, tiel ke ili ne povas partopreni sciencon evoluon. Lekcioj en la angla de germanoj ofte estas subkvalitaj, ili avertas. Krome uzado de la angla nutras la impreson, kvazaŭ germanoj ne plu kapablu esprimi novajn ideojn. Unu jaron poste oni nen-

iel povas konstati efikon de tiu protesto, male politikistoj favoras eĉ pli ol antaŭe instruadon de la angla kaj fajfas pri la germana.

## Akra plendletero

Kontraste politikistoj batalas kontraŭ la angla kaj por la germana en aliaj sferoj. En aprilo la prezidanto de la germana parlamento skribis akran leteron al la komisiono de EU kaj minacis, ke la germana parlamento ne plu traktos leĝproponojn de EU, se ili ne estas tradukitaj al la germana sed aperigitaj nur en angla kaj franca. Germanoj argumentas, ke 24 % de la EU-civitanoj parolas la germanan, kontraste al nur 16 %, kiuj parolas la anglan kaj francan respektive. Certe tio estas prava argumento, sed ĝi validas same por hispanoj, poloj aŭ italoj, kiuj same suferas pro lingva neglekto. Tamen sekve de la plendo el Berlino la prezidanto de EU-komisiono promesis, prezenti la tekstojn ankaŭ en la germana.

Sed protesto jam venis el Finnlando, kiu meze de 2006 transprenas prezidon de EU: Helsinko ne havigos tekstojn en la germana. Tio jam okazis la lastan fojon, kiam Finnlando prezidis kaj uzis nur la anglan kaj francan lingvojn. Germanaj kaj aŭstraj ministroj simple ne plu partoprenis kunsidojn de EU, ĝis fine Helsinko cedis kaj denove uzis la germanan. Sed ŝajnas, ke la batalo por la germana daŭros kaj probable germanoj malgajnos, se ili daŭrigas ambigue: kiel oni povas defendi la propran lingvon se oni samtempe per ĉiuj rimedoj favoras la anglan? Germana kancelierino Angela Merkel, cetere, perfekte parolas la anglan (kaj preskaŭ perfekte ankaŭ la rusan). Almenaŭ ŝi do povas same bone dialogi kun usona prezidanto kaj rus-germanoj ... ■

## NIĜERIO



Lagos, la iama ĉefurbo de Niĝerio

# Kiom da ... disputoj?

**N**iĝerio, la plej loĝata afrika lando kun konjekteble 150 milionoj da civitanoj, entreprenis fine de marto oficialan popolnombradon por scii precize, kiom da loĝantoj ĝi havas. La kvartaga nombrado estis plilongigita je du kromaj tagoj post plendoj, ke milionoj ne estas enkalkulitaj.

Ekde la sendependiĝo de Niĝerio el Britio en 1960 regas disputoj pri la preciza statistiko. Vivas en Niĝerio pli ol 450 gentoj kun malsamaj religioj. Kaj la diversaj etnoj kaj la du plej grandaj religioj, islamo kaj kristanismo, ĉiam disputas, kies grupo pli multnombras. La interna milito de 1967 ĝis 1970

rezultis ĉefe de disputoj pri la tiam popolnombrado.

Ĉi-foje, por eviti antaŭajn problemojn, oni forigis de la enketilo demandojn pri etneco kaj religio – malgraŭ plendoj de la koncernitaj grupoj. Oni esperas, ke la rezultoj kontentigos kaj en- kaj ekster-landajn komunumojn.

La popolnombrado okazis dum periodo de malstabileco kaŭzita de miskompreno pri planoj de la prezidanto ŝanĝi la konstitucion, por ke li restu en sia ofico kvar pliajn jarojn. En 2007 okazos en Niĝerio ŝtataj elektoj kaj jam komenciĝis la planado, malgraŭ tio, ke eble ŝanĝiĝos la konstitucio.

Princo Henriko OGUINYE/pg

## PRIVATECO



# Gvatanto gvatata

**E**n 1978 la usona parlamento, la t.n. „Kongreso”, aprobis la leĝon *Spionado per Eksterlanda Gvatado*. Gi permesas al la registaro interveni en fremdlanda komunikado sen ajna tribunala mandato.

Komence la leĝo celis nur telekomunikadajn kompaniojn kaj ne multe tuŝis la internacian komercon aŭ individuojn. Intertempe ŝanĝiĝis la situacio, ĉefe pro Interreto, sed ankaŭ pro timo pri terorismo. La leĝo pli vaste

aplikiĝas, tiel ke kritikistoj de la usona prezidanto George Bush akuzas lin respondeci pri kontraŭleĝa tirana ŝtato.

Multaj firmaoj riĉiĝis pro la spionada leĝo, provizante registarajn departementojn kaj la militistaron per ekipaĵoj, per kiuj eblas gvati privatajn civitanojn en Usono. La registaro povas nun libere aliri al privataj komputiloj kaj informiĝi pri privataj aferoj.

Tio signifas, ke ordinaraj civitanoj perdas siajn rajtojn pri libera interŝanĝo de politikaj kaj kulturaj ideoj. Sed Bush, kiu iam devos alfronti leĝodonantojn en la usona parlamento kaj defendi sian starpunkton, retenas siajn povojn tiel misuzi la sistemon kaj agi kontraŭ la usona konstitucio.

Elsan B. SNOW/pg



ALBANIO

# Paca ŝlosilo

**F**ruaprilte koncertis en Tirano, Albanio, la muzik-grupo de Goran Bregović, la filo de patro kroata kaj patrino serba, kiu kreskis iom libera je kompleksoj naciismaj kaj ŝovinismaj, karakterizaj por multaj balkananoj.

Pro la milito en eksa Jugoslavio Bregović elmigris okcidenten kaj koncertis en pluraj landoj, ĉiam inspirate de la nocio, ke per muziko eblas krei amikecon.

Intervjuate, Bregović diris, ke li neniam komprenis, kial albanoj kaj serboj malbone interrilatas. Sed eble la koncerto en Tirano, kun 50 muzikistoj, inaŭguros pli pacan estontecon por la popoloj de la maltrankvila duoninsulo. Tial la urbestro de Tirano Edi Rama honoris la muzikiston, donante al li – kio okazas tre malofte – la tiel nomatan oran ŝlosilon de la ĉefurbo.

Bardhyl SELIMI



Goran Bregović



Edi Rama

ALBANOJ

# Eksterlande eminentaj



WIKIPEDIA

*Sandra Bullock estas elektita eminenta albanio. Sed usonanoj tion dementas. Laŭ ili la patro de Sandra Bullock naskiĝis ne en Albanio, sed en Alabamo. Nu, ĉu usona, ĉu albanio, eminenta aktorino ŝi certe estas.*

## Pagana Tirano

**A**lbanio konservas multajn paganajn ritojn. Ekzemple, sur ĉiu nove konstruita domo ili pendigas marioneton, ajlo-bulbaron aŭ huf-ferojn. Ili celebras ankaŭ kelkajn antaŭkristanajn festotagojn: unu el ili estas la Tago de la Somero la 14an de marto. La dato signifas por albanio novan sezonon de agrikultura produktado kaj tiel rilatas al la ĝojo de la vivo.

Antaŭe tiun tagon festis ĉefe la civitanoj de Elbasan, en centra Albanio, sed en 2006 la tagon festis la tuta lando, kaj speciale la ĉefurbo Tirano. Oni piknikis, kolektis florojn kaj faris el ili kronojn. Krome oni preparis dolĉaĵojn, inkluzive de *ballokume* [balokume], specialaĵo de Elbasan. Ĉi-jare en Tirano estis aranĝitaj diversaj aktivaj, ne nur kuirartaj, sed ankaŭ sportaj, dancaj, etnografiaj kaj muzikaj.

Bardhyl SELIMI

**A**ntaŭ nelonge la ĵurnalo *Tirana Observer* publikigis la nomojn de la 50 plej eminentaj albanio. Plejparte ili distingiĝis eksterlande post 1990, kiam Albanio reaniĝis al la granda eŭrop-usona familio. La ses plej renomaj estas: Ismail Kadare (la plej tradukita albanio verkisto kaj foje kandidato por la Nobelpremio); Inva Mula (soprano, debutinta en Parizo); Ana Oxa (kantistino, loĝanta en Italio); Sandra Bullock (usona aktorino) (sur la foto); James Belushi (usona aktoro) kaj Eda Zari (kantistino en Germanio).

Bardhyl SELIMI

TOGOLANDO



# Konfuzo kaj kontraŭdiroj

**La 29an de marto 2006 okazis en Togolando eklipso de la suno. La registaro deklaris ferio la matenon de la eklipso-tago kaj togolandanoj restis hejme. Tamen antaŭe kaj dume regis konfuzo kaj kontraŭdiroj.**

*La togolanda eklipso estigis timon kaj multe da misinformoj.*

**Ĉ**irkaŭ du semajnojn antaŭ la eklipso amaskomunikiloj atentigis, ke oni dume ne rigardu la sunon pro blindiĝo-danĝero. Rezulte homoj aĉetis ĉe apotekoj apartajn

okulvitrojn. Tamen tri tagojn antaŭ la eklipso oni aŭdis, ke la okulvitroj, kiujn disponigis al la popolo la registaro, ne protektas kontraŭ blindiĝo.

Anstataŭe estis dirite, ke oni restu

hejme, enfermita en la propra ĉambro, kaj ne rigardu la eklipson. Krome rondiris diversaj onidiroj: oni malŝaltu elektronikajn aparatojn, kiuj dum la eklipso difektiĝos; oni translokiĝu, se oni loĝas en domo el pajlo aŭ konsistanta el feraĵoj, ktp. Panikis multaj homoj, aĉetante antaŭ la eklipso-tago manĝaĵojn kaj alian provianton.

SANO

## Prezidi la propran psikon

**L**a slovena ŝtatprezidanto Janez Drnovšek, politike aktiva dum 20 jaroj, ekiris laŭ nova vojo. Operaciita pro kancero kaj ne tute kuracita, li decidis turni sin al alternativa vivmaniero.

Nun Drnovšek, kiu prezidis Jugoslavion en 1989 kaj 1990 kaj inter 1992 kaj 2002 la slovenan registaron kaj en tiu ĉi jaro fariĝis ŝtatprezidanto, vivas en kampara domo kaj nutras sin laŭ sanigaj metodoj. Tiel li intencas kontraŭbatali la malsanon per la propra psiko.

Tamen samtempe li uzas sian pozicion por diversaj humanismaj entreprenoj. Li iniciatis intertraktojn inter la serba registaro kaj kosovanoj; li engaĝiĝis por helpi la endanĝerigitan popolon de Darfur en Sudano starigi tendaron por rifuĝintoj; kaj li klopodis venigi al intertraktoj en Slovenio la sudanan

registaron kaj reprezentantojn de la ribelantoj.

### Justeco kaj evoluo

En Slovenio li fondis movadon por justeco kaj evoluo kiel neregistaran organizaĵon. Li vizitis Israelon, kie li renkontiĝis kaj kun judaj kaj kun palestinaj gvidantoj kaj klopodis persvadi ilin plu intertrakti por trovi pacan interkonsenton.

Drnovšek diras: „La vivo estas momento de la nuno. Se ni helpas al aliaj homoj, ni sentas, ke nia vivo havas sencon. Se ni ne ŝarĝas nin per tro da zorgoj kaj postuloj, ni estos kvietaj kaj ni ne malsanos. Se ni komence ordigos nin kaj nur poste klopodos ordigi aliajn, ni eble estos sukcesaj. Se ni ne mensogos al ni mem kaj al aliaj, la mondo estos multe pli simpla. Kaj en tia mondo ni povos esti feliĉaj.”

Zlatko TIŠLJAR

### Rabistoj

Venis la tago mem kaj la ordono de la registaro estis klaraj: „Ĉiu restu hejme, en la ĉambro kun fenestroj kaj pordoj fermitaj.” La stratoj de la ĉef-kaj aliaj urboj restis senhomaj kaj la popolo sekvis la progreson de la eklipso per televido- kaj radio-raportoj. Tamen ne ĉiu restis hejme: rabistoj diversloke profitis la okazon por priŝteli bienojn kaj butikojn aŭ forpreni bredatajn dombestojn.

Ĝuis la fenomenon ankaŭ turistoj, kiuj spektis la eklipson per siaj okulvitroj. Rezulte multaj togolandanoj malcontentis, dirante, ke ilin trompis la registaro, ĉar la eklipso ne tiom timigis, kiom ili atendis. Ekzemple, la prognoza nigro similis al tiu de pluva tago kaj ne al plena nokto.

Tiuj, kiuj memoris la lastan eklipson en Togolando en 1947, diris, ke tiam estis pli mallume. Nun togolandanoj devos atendi ĝis 2081, ĝis okazos la venonta eklipso en ilia lando.

GBEGLO Koffi/pg

# Negro iĝis nigrulo

**J**e la dua posttagmeze, post seshora deĵoro antaŭ la damnita komputilo, Mikela eliris de la oficejo kaj rapidpaŝis al la proksima rapidmanĝejo VEG-SAN. Ŝi hastis pro pluraj taskoj de la tago: je la tria rendezuo kun sia advokato ĉe la alia urboflanko, je la kvina inaŭguro de ekspozicio en la galerio EKIDEOJ, je la sepa ĵudo-kurso ĉe la gimnastikejo SUNLEVIĜO ... Plenŝtopita posttagmezo, kiel ĉiam. Do nepenseble reveni hejmen por manĝi. Oni kontentiĝu pri la kutima rapidmanĝejo, kiun cetere ŝi ŝatas pro ĝia vegetarana kuirejo, garantiite ekologia.

Mikela eniris, enviciĝis antaŭ la servotablo kaj kontente rimarkis la ĉeeston de manĝaĵo de ŝi multe ŝatata: fundoj de artiŝokoj farĉitaj per maĉitaj fungoj, vera bongustega frandaĵo, specialaĵo de la restoracio. Ŝi plenigis teleron per dekduo da artiŝokoj, superŝutis ilin per la aroma konsomeo kaj, post esplora ĉirkaŭrigardo, atingis liberan tablon. Sur ĝin ŝi demetis la pleton, alkrōcis sian mantekon al la seĝodorso kaj sidiĝis, antaŭgustumante la amatan frandaĵon.

Sed jen malagrabraĵo: ŝi forgesis preni forketon. Estante kapabla kaj preciza virino, ŝi malamis tiajn malatentojn. Hodiaŭ mi stultas, ŝi pensis. Ĉagrenite ŝi reiris al la servotablo, nun okupita de vico da klientoj. Post kelkminuta nervoziga reviciĝo ŝi fine havigis al si forketon kaj reatingis sian manĝolokon kaj tie ... senmoviĝis pro la surprizo, preskaŭ ne povante kredi al propraj okuloj. Ĉar ĉe la kontraŭa flanko de la tablo, ĝuste antaŭ ŝia telero, trankvile sidis mezaĝa belstatura negro! Kiu eĉ estis proksimiginta al si la teleron, kaj estis evidente pretiĝanta ekmanĝi ties enhavon, kvazaŭ ĝi estus lia propraĵo!

Je la unua momento Mikelan skuis forta indigno. Nu, vidu kian aferon! ĉu eblas io simila?! Ŝi jam estis prote-



stonta ... sed ne povis: ŝian rigardon rekte renkontis la okuloj de la negro: grandaj lumaj okuloj tiel pacaj, tiel bonvole ridetantaj, ke malamika sinteno montriĝis tute neoportuna.

Rapida esploro certigis ŝin pri la senduba civilizo de la negro: li vestis simplan konvenan ĵerzon, ĉe kies supro aperis blanka ĉemizkolumo: preterlasante lian haŭtkoloron, li povus esti iu ajn indiĝena oficisto, tiom pli, ke sur la apuda seĝo li estis apoginta oficistan ledan tekon.

Eble senvola miskompreno, pensis Mikela, kaj pretiĝis klarigi la aferon ... sed ne povis. Per afabla gesto la negro indikis al ŝi la kontraŭan seĝon, evidente invitante ŝin sidi. Liaj movoj estis amikecaj, senstreĉaj, eĉ elegantaj; ŝi ne povis rifuzi. Preskaŭ senvole ŝi trovis sin sidanta rekte antaŭ li, kaj antaŭ sia telero, kiu troviĝis proksimume je la mezo de la tablo, sed nun iom pli proksima al li ol al ŝi. La tuta sceno disvolviĝis en plena silento: vortoj superfluis.

Nun de Mikela, sociema verva virino, malaperis ĉia indigno, anstataŭite de surprizo, scivolemo kaj, jes, eĉ ia amuziĝa komplaceco, kvazaŭ temus pri ludo. La simpatia aspekto de la negro, lia evidenta sendanĝereco, kaj la humura situacio tiklis ŝin. Verŝajne li ne havas monon por pagi la manĝon, ŝi pensis. Nenio grava, ne pro tio mi fastos. Sen rompi la silenton, jam iĝintan

ludregulo, ridetante ŝi proksimigis al si la pleton, per la forko enpikis artiŝokon kaj portis ĝin al sia delikata rozkolora buŝeto, ĝin mordetante kun evidenta plezuro: unua ludmovo.

La negro ne prokrastis la kontraŭmovon: same ridetante, per milda, timema movo, li remetis la teleron ekzakte centre de la tablo, kaj imitante ŝian geston, siavice enpikis alian artiŝokon kaj senĝene enbuŝigis ĝin tutan tra siaj dikaj lipoj brilnigraj kiel polurita ebono.

Nu, li jam havis forketon preta, pensis Mikela, do ĉio estis programita. Sed tio, anstataŭ rekolerigi ŝin, pliintensigis ŝian amuziĝon. Bone, mi memvole nutras negron sen esti perfortata, ŝi gaje pensis, tio almenaŭ impresos mian patrino!

Mikela ne havis grandan sperton pri negroj. Ŝi ŝanceliĝis inter du kontraŭaj skoloj: unuaflanke la patrino, de ĉiam ligita al dekstreca movado, daŭre furiozis kontraŭ „tiuj simioj, kiuj venas por ŝteli nian laboron kaj perforti nin virinojn“; duaflanke la ĉiutaga socia sperto. En Satandonja la negroj delonge plimultiĝis; en la oficejo de Mikela laboris senegalanino, en la ĵudo-kurso partoprenis du niĝerianoj; surstrate, en superbazaroj, kinejoj, lernejoj svarmis vizaĝoj kun ĉiuj nuancoj de nigreco; ilia konduto, tute normala: nur maniulo povus ankoraŭ dubi pri ilia egalrajta civitaneco. Pro tio en Mikela, kiu intense ►

# Islanda historia romano

*Sagao de Njal* apartenas al la t.n. *Islandanaj Sagaoj*, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 11-a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn.

*Sagao de Njal* estas la plej granda kaj artisma el la sagaoj. Malgraŭ vasta personaro kaj komplika eventaro ĝi formas arte kunplektitan tutajon; oni havas la impreson, ke ĝia aŭtoro havis enmense ĝian lastan vorton jam en la komenca ĉapitro. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis la definitiva solviĝo en la fino.

Personecoj atestas pri si mem per vortoj kaj faroj, neniam estas dirite, kion ili pensas.

La sagao estas tradukita jam en multajn lingvojn. Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj lastjare *Sagao de Njal* estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda fikcia literaturo.



Paĝoj: 357; ilustrita; 21 cm; kudre blindita; 2003;

Prezo: € 18,00


Informoj:

tel. +32 3 234 34 00;

fax. +32 3 233 54 33;

rete: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► frekventis la socian vivon, la patrinaj ideoj jam ne plu efikis. Escepte de unu apartaĵo: la vorto „negro”. Ŝi konstante uzis ĝin. Ŝi diris „la negrino el la oficejo ...”, „la du negroj el la ĵudo-kurso ...” lafoje ŝia edzo rimarkis: „Tiu vorto elvokas negativan nuancon, prefere nomu ilin ‘nigruloj’, samkiel vi estas ‘blankulino’.” „Ne,” ŝi protestis, „mi ĉiam diros ‘negroj’: tiaj ili estas, eviti tiun vorton estas hipokrite!” Nu, faru laŭplaĉe, diris la edzo ŝultrumante.

Kaj nun la „negro”, ŝia silenta ludkomplico, formanĝinte duonon de la artiŝokoj, prenas la malplanan teleron, mansignas ke ŝi atendu, kaj post nemulte revenas kun telero da kukurbetoj je petroselo, kiun li demetas sur la tablocentron. La ludo rekomenciĝas, la kukurbetoj malaperas en la du diverskolorajn buŝojn tute same kiel la artiŝokoj, kun egala plezuro. Post kio la negro releviĝas, ĉi-foje por foriri. Li prenas sian teknon, silente salutas la blankulinon per larĝa rideto kaj eleganta kliniĝo, kaj rapide foriras. Mikela, superinte la surprizon, decidas siavice foriri. Per la mano ŝi serĉas la mantekon, sed ... ĝi ne plu troviĝas ĉe la seĝodorso! „Kio?! Do tiu negro ...” Ŝi jam estas krinta: „Kaptu la ŝteliston!” ... sed blokiĝas: per la okulvosto ŝi ekvidas sian mantekon pendanta de alia seĝodorso, du tablojn malantaŭ sia sidloko; kaj sur tiu tablo troviĝas pleto kun telero da artiŝokoj jam malvarmaj, kaj sur tiu pleto ne vidiĝas forketo ...

Fulmrapide ŝi ekkonscias pri tio, kio okazis. Ne la negro manĝis de ŝia telero, sed ŝi manĝis de la lia; kaj aldone ŝi ricevis kromfrandaĵon: ĉio senpage!

La evento pensigis ŝin dum la tuta posttagmezo.

Vespere, en la litĉambro, ŝi diris al la edzo: „Hodiaŭ trafis min kurioza okazo: nigrulo regalis min per bongusta manĝo!” „Ĉu nigrulo?” surprizite demandis la edzo. „Jes, simpatia, ĝentila nigrulo” ŝi konfirmis.

Sen Rodin

Pliaj noveloj de Sen Rodin baldaŭ aperos ĉe FEL en la verko *Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj*.

MADAGASKARO

# Kontraŭleĝa kopiado

**Laŭlonge de la stratoj de la ĉefurbo Antananarivo staras bretaroj sur kiuj estas prezentataj kaj vendataj kompaktaĵoj kun buntaj albumsaketoj. Amplifilo kaj televidileto montras provaĵon por logi klientojn.**

**T**emasprivendistojde kontraŭleĝaj kasedoj kaj diskoj kun kantoj, filmoj aŭ skeĉoj malagasaj kaj fremdaj. La lokaj originaloj samtempe vendiĝas, kvinooble pli kostaj ol la kontraŭleĝaj produktaĵoj, en butikoj. El Azio venas amase kopioj de fremdaj produktaĵoj. Apudstrata vendado furoras pro tio, ke la plej multaj povas aĉeti nur tion, kio malmulte kostas. Pro la alta profito rapide pliriĉiĝas la „piratoj”, kiel oni nomas tiujn kopiemojn. La apero de la kompakta disko plifaciligis ilian taskon. Sufiĉas ja disponi pri komputilo kun gravurilo kaj presilo por eldoni tiom, kiom oni bezonas.

Falsaj diskoj multe vendiĝas precipe antaŭ Kristnasko, Pasko kaj la junia nacia festo. Tamen la relativa komforto de tiuj „piratoj” daŭris nur 2 aŭ 3 jarojn. Antaŭ la fino de 2005, kantistoj kaj filmproduktantoj ekĉasis ilin tra la urbo, konfiskante milojn da kontraŭleĝaj diskoj kaj novajn komputilojn. La artistoj ne plu eltenis la tro videblan avantaĝon, kiun akiris kopiistoj el ilia ŝvito. Kvankam ekzistas la oficiala organo OMDA, supozata protekti la aŭtorrajton, ĝi registras nur kopirajtan monĝiradon post spektaklo aŭ radio-kaj televido-elsendo. La manifestacio fare de la artistoj provokis malfavoran reagon, ĉar ankaŭ ili ne respektis la leĝon. Tial, pli poste, ilin akompanis agentoj de OMDA aŭ policistoj.



Antananarivo

Vera ŝtelista reto dissendas la kopiitajn diskojn tra la lando. Plej stranganas tio, ke filmo apenaŭ projekciata en kinejo jam aĉetebblas ĉe nerajta vendisto eĉ en fora kamparo de la provinco! Simplas la klarigo: iu el la produktantoj ŝatas akiri pli da profito kaj kaŝe ofertas al kopiemojn la matricon de la filmo. Tial kelkaj artistoj preferas rezigni pri famiĝo kaj atendas la oportunan momenton por memprodukti anstataŭ esti vorataj de profesia produktanto. Tamen fakto nerefutebla estas la (eble sola) pozitiva flanko de kopiado: la rapidega diskonigo kaj disfamiĝo de novaj talentuloj tra la tuta lando. Cetere, la ĝisnuna kopirajto koncernas nur la lokajn produktaĵojn, ebligante al la vendistoj kopii kaj vendi artistan artiklon el eksterlando.

Se reveni al la kompakta disko, kelkaj kontrabandintoj (ĉefe futuristoj el Eŭropo) provis produkti malbonkvalitajn filmojn pornografiajn kaj dissendas ilin tra organizita vendoreto. Ne facilas trovi tiajn filmojn, ĉar nur el sub la akseloj de surstrata vendisto ili akireblas.

Aliflanke, kopiado ne limiĝas nur al kontraŭleĝa gravurado de artistaj diskoj, sed etendiĝas ankaŭ al komputilaj programoj tre diversaj. Per kvar eŭroj oni povas aĉeti komputilludon, kodromon pri lernado de la angla aŭ programon pri bildoprilaboro. Same facilas enmanigi al si version de la mastrumaj sistemoj *MS Windows 98* kaj *XP* aŭ la lastan eldonon de la oficeja programo *MS Office*. Antaŭ unu jaro tamen, agentoj de Microsoft en Antananarivo faris kontrolon ĉe retkafejoj, komputilvendejoj kaj en kelkaj privataj firmaoj. Kiam mankis Microsoft-licenco, ili pagigis al la respondeculo milionojn da arjaroj (1 eŭro = 2500 MGA) kiel monpunon, sen forgesi konfiski ĉiujn materialojn.

Ĉefa fonto de programoj kaj fremdaj kantoj estas la ret-elŝutado, dum filmoj akireblas danke al persatelita televidkanalo. Enprizonigado de la deliktuloj ne forigos la ŝtelkopiadon, ĉar la kvalito estas ne ĉiam la trafa argumento antaŭ mizerega konsumanto. Cetere, apenaŭ percepteblas la kvalita diferenco kompare al la originalo.

FIDILALAO Henriel

# La okcitanana lingvo



*La 29an de oktobro 2005, homoj el ĉiuj okcitanaj teritorioj manifestaciis en urbo Carcassona [karkasuno] por la okcitana lingvo*

**U**nue, mi ne estas fakulo pri tiu ĉi temo. Mi prezentos ion sed mi jam forgesis multe. Mi devis simpligi, ĉar mi ne volas tedi vin tro multe. Pri tio mi bedaŭras. Devas mi tuj difini kelkajn insidajn vortojn. Tio estas preskaŭ deviga.

Laŭ la politika pensmaniero lingvo estas lingvoformo de unu ŝtato aŭ lingvoformo agnoskita de tiu ŝtato. Tiusence la nederlanda estas lingvo, samnivela al la germana. Samtempe *Plattdeutsch* (malaltgermana), varianto de la nederlanda sed en Germanio, estus dialekto germana.

Laŭ la pensmaniero de la plimulto de la lingvistoj la lingvo estas esprimmanieroj, kiuj ebligas interkompreniĝon,

post iom da adaptiĝa tempo. Aldone, plaĉas al multaj krei difinon propran. Estas nenio pli universala ol la ŝovinismo. Samtipajn problemojn havas ni, pri la difino de la vorto „dialekto”.

Revenu ni al la okcitana lingvo. Ĝia natura areo kovras trionon de Francio, ankaŭ parton de la itala Piemonto kaj kelkajn valojn nord-hispanajn. Kelkaj personoj aldonas la Katalunajn Landojn.

### **Tri grandaj dialektoj**

La okcitana havas tri grandajn dialektojn, la sud-okcitanan, kun la langvedoka kaj la provenca, la gaskonan kaj la nord-okcitanan kun Limoĝio,



*La natura areo de la okcitana kovras trionon de Francio, ankaŭ parton de la itala Piemonto kaj valon nord-hispanan. Kelkaj aldonas la Katalunajn Landojn.*



Aŭvernjo ĝis Piemonto. Tie oni ŝuŝas: Praktike, sud-okcitanaj vortoj kiel „*cantar*” [kantá] (kanti) iĝas „*chantar*” [ĉantá aŭ cantá].

Menciindas ankaŭ la t.n. Lun-arko, kie intermiksiĝas la franca kaj okcitana lingvoj. Kun 80 % da komuna vortprovizo inter la diversaj dialektoj, oni konsideras ilin kiel unusolan lingvon.

Antaŭe oni diris al mi: ĉe mi oni parolas „dialektaĉeton” (france: *patois*), nekomprenblan eĉ mallongdistance. Tamen, jam tiu epoko, mia avo diris, ke en Avinjono li parolis la limoĝan kaj oni respondis al li en la provenca dialekto. Poste, multaj similaĵoj: piemontano en norda Limoĝio, limoĝano en Gaskonio, aŭvernjano en Barcelono ktp.

Historio, pri kiu oni rajtus fieri. Subtilaj literaturo kaj muziko. Ĝi revoluciigis la tuteŭropan pensadon kaj estetikon, kaj influis la tutan okcidentan Eŭropon dum pli ol 200 jaroj inter la 11a kaj 14a jarcentoj. Tiu literaturo pludaŭris bonebone ĝis hodiaŭ.

En la mezepoko ĝi spegulis originalan civilizacion kun sento pri egalrajteco, preskaŭ egaleco, preskaŭ demokratio. Merito kaj spirito agnoskitaj antaŭ la socia nivelo. Pluvivado de la romia juro kiu garantiis liberecojn.

La trubadoro estas kreinto, kiu mal multe interesiĝis pri religio. Li (aŭ ŝi!) estas funde laika, alidire la verkoj estas eksterreligiaj, la ĉefa temo estante la gehoma amo. Ĉu vi divenas al kiu tio ▶

*Aran, eta valo en Hispanio, estas la sola teritorio kie la okcitana, en sia gaskona varianto, estas plene oficiala, kune kun la kataluna kaj la hispana.*





En la malmultaj dulingvaj afiŝoj videblas ke la francigo de la toponimio sensignifigas loknomojn.

► ne plaĉis tiuepoke? Sed rezultas, ke la virino estis promociita en la socio.

Al mi oni ne antaŭe parolis pri tiaĵoj. Komence mi eĉ ne kredis pri tio. Estis diraĵoj de aktivuloj okcitanismaj iom menslimigitaj. Ĝis kiam mi legis la samon, en libro en la portugala, por portugaloj, pri la originoj de ilia lingvo kaj literaturo. La portugala ekskribiĝis laŭ la samaj principoj kiel la tiuepoka kultura lingvo. Oni daŭre rimarkas parencecon kun la okcitana. Tiu skribsistemo estas daŭre uzata en Okcitanio. Ĝi mildigas la dialektajn malsamecojn.

Ĉu vi konas la aŭstralian anglan, la argentinan hispanan, la brazilan portugalan?

Neniu parolas pri „patois” en Bonaero. Tamen la „ll” prononciĝas „ŝ”, la „y” aŭdiĝas kiel „j”. Anstataŭ la madrida „metro” oni diras „subte”, mallongiĝon de „subterraneo”, subtera trajno; „remolque”, remorko, estas „acoplado”, kuplitaĵo. Oni facile adaptiĝas.

Tiu malkovro rilate al la okcitana estis por mi grava momento. De tiam mi dubas pri preskaŭ ĉio. Tute ne estas malgaja afero! Tamen mi hodiaŭ nur relative fidas al la personoj, kiuj formis mian personecon, kaj al la personoj, kiuj informas min.

En la prihistoria libro de mia filo oni povis legi nur: „La norda kaj la suda partoj de Francio parolis du lingvojn (ne mencitajn). Je la nordo estis la ‘truvatoroj’ (france: *trouvères* [truvér]),



Per la devizo „parolu la francan, estu puraj”, legebla en lernejoj, multaj okcitanlingvanoj akiris la konscion paroli „dialektaĉeton” (france: *patois*)

je la sudo la ‘trubaduroj’ (france: *troubadours* [trubadú]).” Nenion pli. Nigra truo!

Sekve, multaj el la fakuloj pri la antikva okcitana estas eksterlandanoj. La ĉefa vortaro al la franca estas verkita de germano.

### Kulturŝoko

Ĉu vi scias, kio estas kulturŝoko? Ŝoko signifas ion. Estas kiel pugnofrapo pro kiu oni restas kapturiniĝante.

Mi sentis tion plurfoje en similaj okazoj. Post relative longtempa lernado de lingvo, post sufiĉe da legado kaj da interparolo kun la koncernaj landanoj. Estis ĉiam ripozmomento. Estis ĉiam sur publika vojo, rigardante la preterpasantojn. Mi ekkonsciis pri la kulturdiferenco, pri la malsama komprenado de la mondo, kiun mi antaŭe ne imagis.

Bum!

Escepto: Ĉinio. Mi ne lernis la ĉinan. Sed la pensmaniero estas tiel malsama!

Mi imagas, ke komprenante la lingvon eble daŭre turniĝus mia kapo.

Nu, bone!

Precize la samon sentis mi en loko, kie mi tute ne povis antaŭpensi ion similan. Estis antaŭ mia domo, en la departemento Corrèze (okcitane: Corresa), rigardante preterpasantajn vilaĝanojn, kiujn mi de ĉiam konis, post kelkaj jaroj da intereso pri ilia lingvo, post ol paroli kun ili pri temoj kiuj vere interesis ilin, preter la antaŭfaritaj frazoj, en lernita franca lingvo.

Tio, kion mi volis diri estas: paroli lingvon tute ne nur signifas, ke oni po-

vas diri „sidilon” laŭ du aŭ kvin diversaj manieroj. Alidire, tio ne ebligas nur praktikan komprenon, sed eblas malkovri aliajn komprenmanierojn.

Pri suno kaj luno: Kiam germano diras „sunino” kaj „virluno”, la tuta perceptado de la mondo aliĝas (estas male en la latinidaj lingvoj: „virsuno”, „lunino”).

Alilandano lernante la francan, enkapigante ekzemple la vorton „laïcité” (laikeco), samtempe malkovras la signifon. Ĉe li, estas ĝenerale tradukita kiel „toleremo” aŭ „sekularigo”. Eĉ en PIV, ĝi estas malbone tradukita.

Al la franca lingvo plaĉas la abstrakteco. Verŝajne tio fontas en la originaj altklasaj medioj kun relative malmultaj materialaj problemoj, kiuj trudis ĝin. Tio estas kvalito, sed ankaŭ kreas malfacilaĵojn.

La okcitana lingvo, pere de sufiksoj, ofte samtempe diminutivaj kaj plifortigaj, pli bone reflektas la homajn sentojn, ĉu pozitivajn, ĉu aĉgajn. Kiam oni ekzemple parolas pri „Piaron” [pi-orú], eĉ „Piaronet” [pioruné], oni ne nur parolas pri Petro, kiu estas malgranda, sed oni parolas ankaŭ pri amata/amegata Peĉjo.

Kiu ne aŭdis en Aŭvernjo la okcitandevenan verboformon „Je l’ai eu fait” (el „z’ai gut fach”, mi iam faris tion)? Nedifinita pasinta tempo, double kompleksa, kiu mankas en la franca al tiuj, kiuj kutimas uzi ĝin.

### Elvokoj malantaŭ vortoj

Kaj la kromsignifoj, konotacioj? Du vortoj, objektive samsencaj, sed perceptitaj malsame. Por francoj *manĝi*



estas gastronomio, komuna plezuro, amikoj, familio, samideanoj, zamenhofa tago. Por norvego tio estas bagatelo, malŝparita tempo. Kiel li povus kompreni la verkiston Rabelais?

Difinita socio kreas lingvon, kiu poste helpas pludaŭrigi kelkajn partikularaĵojn pro propraj kvalitoj kaj pere de la kulturo kiun ĝi disvastigas.

Tion klarigis antaŭ nelonge juda verkisto rilate al la hebrea. Li pitoreske diris: „Legi la Bibliion tra tradukaĵo, estas same kiel kisi la patrinon tra naztuko”.

Ĉi tiu aŭtoro, Benjamin Gross, skribis ankaŭ pri la traduko de la Biblio komence de nia erao: „La uzo de vortprovizo veninta el tute malsama pensmondo ol la hebrea mondo ne povis ne distordi la konceptojn, kaj influu la ŝanĝojn de enhavsignifoj. Tiuj diferencoj, subtilaj aŭ drastaj, ne estas neŭtralaj: ili enhavas historiajn aludojn kontrastajn, espermesaĝojn kontraŭajn kaj generas signifkarakterizojn kaj identecojn discelajn”.

## Malsamaj humuroj

Ĉi-kampe estas grava problemo. Ĉie! Oni tute ne traduku aŭvernjan amuzafon. Oni povas krei malakceptadon, malestimon. La lingva nivelo estas malsama. La kromsignifoj estas malsamaj. Mi vere pensas, ke la lingva bunteco estas ja rimedo kontraŭ la nuna tendenco al ununura pensmaniero. Tio estas ankaŭ fonto de eltrovoj, de granda miro.

Mi retroiras iomete por citi tekste-tojn de la svisa lingvisto Claude Piron: „Kiam oni komparas la francan kaj la

anglan, oni konstatas, ke la unua aludas kie la dua eksplicitigas, kaj niaj transmaraj najbaroj uzas priskribeb-lajn, sensorajn vortojn el la ĉiutaga lingvo, samloke kie ni uzas abstraktajn precizdifinajn, sciencaspektajn esprimojn.(...) La anglosaksa sistemo estas praktika rilate al la memoro, sed faciligas miskomprenojn.(...) La angla konfidegas la kuntekston. La franca ete.”


Vole nevole, la lernado de la angla kondukas al prioritata intereso pri la nord-amerika kulturo kaj ideologio, kaj iom post iom ĝin persone alpreni. ▶



*Padena la humoristo, Nadau la muzikbando, kaj la fajroj de Sankta Johano, jen montriloj de la nuntempa okcitana kulturo*



*La kastelo Montsegur estas lasta reduto de la okcitana rezisto, ĝi kapitulacis al la franca krucmilito en 1244. La monumento omaĝas la tiamajn mortigitajn katarojn.*





Tuluzo

Antaŭe rakontoj, kantoj, reflektis la tutan vivon: heroaj, komikaj, kontraŭklerikalaj, primokaj, erotikaj ktp. Vera plezuro. Kaj oni longdistance piediris por ilin aŭdi. La tiel nomataj „folkloraj grupoj” nur aŭdigas senfortan elektadon.

Ĉi-foje mi limigos miajn parolojn je Limoĝio, pro tio ke mi pli funde studis ĝian okcitanan kulturon. Tiu parola kulturo reflektis originalan societeton, pri kio mi antaŭe ne konsciis, eĉ se mi jam konis kelkajn elementojn pri mia naskiĝregioneto. Ankaŭ tio estis malkovro. Kamparana socio, de longe samrajtiga, kolektiva, (grandaj komunaj terenoj, malgrandaj individuaj), nereligia, eĉ se oni devis reteni sin rilate al la paroĥestroj kaj la burĝoj terposedaj. Oftega interkonsento kun la kastelestroj ne tro orhavantaj. Mi rimarkas antaŭromiajn radikojn kaj ligilojn kun kelkaj moralaj valoroj de la trubaduroj, ne forgesante, ke la unuaj trubaduroj estis limoĝiaj.

Hodiaŭ plaĉus al mi povi interesiĝi pri alia parola kulturo, eble afrika aŭ anda.

### Neebla dulingveco

Pri io alia mi delonge profunde konsciis. Estas la neeblo de la dulingveco en unu homgrupo.

Dulingveco. Ĉu ne? Alia vorto komprenata diversmaniere. Ni vidos! Mi ne konas, ankaŭ ne aŭdis pri dulingva homgrupo dum pli ol tri generacioj, preskaŭ unu jarcento. Bedaŭrindege, disvastigita dulingveco estas nur etapo inter du unulingvecoj. Laŭ la vigleco de la du lingvoj, unu anstataŭas la alian, aŭ ili diversnivele miksiĝas. Azio,

Ameriko, Eŭropo. Ĉie en la mondo, la meĥanismoj samas. Individuoj, eĉ konsciaj, malmultege povas kontraŭfari.

Mi rimarkis en Aŭvernjo kaj Limoĝio tion, kion mi povis aŭdi kaj legi.

1a etapo: trudo de nova lingvo pere de politika aŭ ekonomia potenco. Valorigado, de la ideo de dulingveco, kiu ofte fariĝas mito. Kulpigado de la neregantoj de la nova lingvo. Alidire, ili kulpas pro nekono.

Antaŭ jarcento en Aŭvernjo preskaŭ neniu estis denaska franclingvano. Tamen francaj vortoj kaj esprimoj ekniris. Specifeco franca: oni ne parolas pri dulingveco. Oni trudis la komplekson de la „patois”. Verdire rezultas la samo, sed kun pli da malestimo.

Poste la gepatroj, kiuj ne parolis france, provis paroli tiulingve kun la gefiloj. La denaska lingvo de tiuj gefiloj estis mikslingvo. Ili eĉ ne plu havis la avantaĝon de la dulingveco. Ili ne plu konsciis, ke estas du malsamaj lingvoj. Por ili estas normale diri franc-okcitanane „va barrer le jar” anstataŭ „va fermer le coq” aŭ „vai barrar lo jal”.

Ili sentas sin hejme, nek en Parizo, nek en alia okcitanlingva loko. Nur en la naskiĝvilaĝo. Tio estas la plej malagraba etapo.

La sekva generacio, almenaŭ ĉiutage pli bone vivas, sed tute ne ĉion regas. Handikapaj. Eĉ kandidato por la administracia altlernejo ENA aŭdis dum la konkurso: „vi revenu post perdo de via suda akcento”.

Plorinde estas tro malfrue por la okcitan lingvo. Klopodu ni protekti la aliajn eŭropajn lingvojn fronte al la angla. Ĉi-momente estas nur la unua etapo. Kun kolektiva konscio ĉi-momente ankoraŭ eblas haltigi tiun evoluon. Ĉu vi volas ke, post jarcento, oni parolu nur la francan en la lokoj, kie oni hodiaŭ daŭre parolas la okcitanan?

Saman riskon por la plimulto el la ĉefaj eŭropaj lingvoj. (Mi deziras aldoni, tio neniamaniere estas kontraŭ la amike respektataj angloj kun interesa lingvo.)

En Francio, ni vivas en escepta momento de la historio, kun malmulte da lingva discriminacio. Mi neniel volas ke miaj gefiloj iĝu membroj de la viktima generacio.

Clair MAHÉ

### ► Parola kulturo

Eble vi havas specialan intereson pri filozofio. Tiukase mi bedaŭrinde senrevigos vin. Kiam mi multe legis en la okcitana, mi ne apartigis tiun legkampon. Mi tamen antaŭnelonge relegis ion pri la mito de la dulingveco. Sed, ne bone memoras mi pri la aliaĵoj.

Kontraŭe, mi renkontis personojn, kiuj iam mallonge studis en lernejo, sed kun bona rezonkapablo. Ili pensis surbaze de mensreferencoj tute aliaj ol la niaj. Malsama vidmaniero pri la mondo kaj la socio. Nur unu problemon havas ili: ili foje „reinventas la radon”. Tion ankaŭ mi eble faras ĉi tie.

Rilate al la provinco Limoĝio, la penso iom apartiĝas el la judkristana. Egaleco kaj solidareco estas gravaj ideoj. La katolika religio apenaŭ ekzistas. La pastro kaj la sakristiano estas ŝerculoj. Oni trovas ion similan en kelkaj regionoj de Aŭvernjo kaj de Burbonio.

Mi praktike malkovris, ke oni povas havi iom da kulturo ekster la legado.

La kulturaĵoj, kiujn oni hodiaŭ daŭre povas kolekti estas ĉefe humuraĵoj, porinfanaj rakontoj kaj tedaj kantoj. Tio estas kio laste restas.

# Ŝtato, eklezio kaj „ideologia” laikeco

**Ne pasas tago, en epoko de referendumo pri la brua temo rilate embrian homan vivon, sen ke, en martela insisto en Italio, politikistoj aŭ intelektuloj sin sentas devigataj hororigite rimarki, kiel la katolika eklezio senrajte enmiksiĝas, per la tuta pezo de sia aŭtoritateco, en aferojn, kiuj konstitucie ne apartenas al ĝia kompetento-sfero.**

Tiel la eklezio eksterkampe ludas, kiam ĝi parolas al siaj adeptoj, eĉ pri temoj etik-moralaj, kontraste al ŝtataj iniciatoj. Ĝiaj sciigoj rilate leĝojn jam aplikitajn sed submetitajn je popola juĝo similas al premego kontraŭ la ŝtato. La ĵurnaloj kaj revuoj plenplenas je tiuj debatoj, argumentataj jen populare jen intelektule.

La preteksto estis kreita, ĉar la itala eklezio, okaze de referendumo lanĉita de radikalula partio por akiri per popola voĉdono la abolon de normoj malpermesantaj la manipulado de homa embrio, proponis al siaj adeptoj ne partopreni balotojn, por ke ne estu atingita la leĝa kvorumo. Finfine la kontrasto kerniĝis laŭ la demando: Ĉu la homa embrio estas jam individua vivo kaj, do, jam persono, aŭ ĉu ĝi ankoraŭ ne atingas la homan nivelon pro kio licas, morale kaj leĝe, ĝin manipulasi?

La katolika eklezio en Italio defendis la unuan vidpunkton kaj invitis voĉdoni kontraŭ la modifo de la prijuĝenda leĝo (rubrikita 40), kvankam ĝi entenas elementojn absolute nekatolikajn. Tiu invito hirtigis la kontraŭekleziularon, el kio naskiĝis la akuzo de malrespekto de la ŝtata laikeco.

La katolika flanko, politikista kaj intelektula, respondis, substrekante kontraŭdirojn en la akuzo. La vorto „persono” ekscitas reagajn miskomprenojn kaj utilas antaŭmeti distin-

gon: laŭ *persono* ĉi tie estas intencita la tuta, nek kreskanta nek malkreskanta, digneco de la homo, sendepende de ties aktuala mensa stato; por *personeco*, male, oni rilatigas al la disvolviĝo de la personaj karakterizoj, kiuj ordinare povas kreski/malkreski.

## Paradoksa situacio

La itala konstitucio kaj la leĝoj kaj la praktiko rekonas al ĉiu civitano kaj asocia grupo la rajton sin deklari konsenta aŭ malkonsenta aparte en aferoj de elstara valoro rilate la personan respondecon. Kaj jen paradokso: la civitano unuopa aŭ asociita ne ĝeniĝas, se tiu malaprobas kaj protestas aŭ proponas modifojn plibonigajn laŭ sia vidpunkto, dum se tiu civitano estas kredanto, aŭ se tiu civitanaro grupiĝas en eklezio, tiu ne rajtas je tio, kaj eĉ krimas kontraŭ la ŝtato.

Por subteni sian tezon, la akuzantoj alvokas la principon de laikeco, nome de la totala sendependeco de la ŝtato de religio ĉiuspeca; laikeco asertata eĉ de la civitanoj organizitaj en eklezio. Jen nova paradokso: civitanaro rajtas propagandi pri sia homvizio kaj socikoncepto, sed tio ne estus permesata al civitanaro kredanta.

La akuzo displitiĝas en diversajn formojn, inter kiuj elstaras la sekva: kredantoj prenas instruon el io supernatura kaj eksterhoma; la akuzitoj respondas, ke ili deduktas siajn



*Grafo Camillo Benso di Cavour estis la granda favoranto de „libera eklezio en libera ŝtato”.*

filozofiajn kaj prisociajn kaj prihomajn konceptojn el la homa racio, kaj ke ĉiu rajtas eventuale inspiro ĝi je tio, kion tiu mem juĝas homdigna, samkiel aliaj rajte inspiro ĝas je aliaj filozofioj proksimaj aŭ malproksimaj space kaj tempe.

Koncedite, ke eĉ tio veras, la akuzintoj pli insistas: la ekleziularo, laika aŭ ne laika, pretendas enŝovi, per siaj intervenoj, ion certecan, ion definitivan, ion absolutan; kaj ili ekzempligas la pretendon, ke estas natura morala leĝo, kiu elfluas el la homa konscienco, kiu kapablas harmoniigi pensojn kaj agadojn de ĉiuj homoj. Sed, ĝuste tio ne plu harmonias kun la modernaj tendencoj, laŭ kiuj nun la homoj jam akiras senton de sendependeco de ĉio ekster propra volo kaj laŭ kiuj ili rajtas decidi, kreante sian moralon aŭ sian sendependecon de moralo.

Male, per siaj instruoj kaj sugestoj la ekleziulara kredantaro blokas la homan progreson kiel en la malpermeso modifi kaj uzi embriojn por eksperimentoj aŭ por plisaniigi homojn. Evidentas, ke, desupre suben, kuras relativismo, absoluta relativismo, kiun ankaŭ la nuna papo, tiam kardinalo, kritikis, kune kun katolika intelektularo, asertante ke per ĝi la homo disipas sian humanecon.

Akuzintoj kontraŭ la intervenoj de la eklezio daŭrigas: estas la monoteismo malferme konfesata de la kristanaj eklezioj, kiu puŝas al tiuj „kontraŭleĝaj” enmiksiĝoj, kvazaŭ alproksimiĝoj al estontaj konsekvencoj, nome vojoj al perforto, ĉar estas montrate, ke monoteismo igis homojn reciproke violentaj en siaj nepraj rilatoj. Tra tiuj tendencoj ►

David Galadí-Enríquez  
kaj Amri Wandel

# La kosmo kaj ni

Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo  
(dua plivastigita eldono).

Vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio,  
verkita de du profesiaj astronomoj.

224 paĝoj; ilustrita; bindita; 2005

Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko  
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

bŭtiko@fel.esperanto.be  
www.retbutiko.net

aŭ ĉe via preferata libroservo

Premio Pirlot  
2001

► pasas eĉ la nerajta premego kontraŭ la libero de civitanoj aŭ ŝtato.

Kion la katolika flanko respondos al ĉi lasta akuzo, en kiu historio, psikologio, antropologio ktp postuliĝas en koncerto kun cent aliaj sciencoj? Krom la doktaj respondoj, ĉi tie interesas la praktikaj, inter kiuj jen la lasta en la listo de decida efiko: ankaŭ ŝtato vivis, kreskis, floris inter krimoj, ankaŭ en ĉiuj homaj rilatoj okazis malamoj kaj krimoj, eĉ tie kie svarmis politeismo, eĉ kie monoteismo estis batalata. Ĉu ĉiuj kune povus eliri el la homa estonteco?

## La principo de Cavour

En la debaton envenas novaj kategorioj de „laikaj” intelektuloj, kiuj ne disdegnas rekoni valorojn kristanajn, kvankam foje miksitajn kun aliaj nekristanaj. Tiun kategorion oni, eble ironie sed ne tro, difinis „intelektuloj devotaj”. Temas, ververe, pri, eble ne nova, intelektula klerularo, kiun iuj ĵurnalistoj, eble iom malŝate, difinis ankaŭ kristanistoj: kristanaj valoroj en nekredanta intelektulo, ĉi-okaze defendanto de la individua vivo de la embrio kaj pro tio defianta malŝaton kaj mokon.

La akuzantoj apelacias al la principo de Cavour pri „libera eklezio en libera ŝtato”; sed la principo, klara en siaj vortoj, venas turnita kaj returnita, ĝis kiam al la eklezio rezultus jes libera, sed nur en sakristioj aŭ preĝejoj, kvazaŭ la ŝtato rajtus krei animdividitajn homojn: ĉe si pensi iamaniere sed ekstere devigite silenti. Kaj se eĉ tio estus absurde permesita, je vidpunkto de juro kaj de psika prospero, estus la principo mem „libera eklezio en libera ŝtato”, kiu, laŭ la nova interpreto, lamus, ĉar ĝi korodas la liberaldemokratian politikan sistemon kreitan en Italio.

Bonŝance komentistoj sin deklariantaj sendependaj opinias, ke akuzoj kontraŭ la katolika regantaro en Italio eliras pli el amareco pro la junia referendumo malvenko (15,9 % voĉdonintoj kontraŭ 84,1 % de nevoĉdonintoj + 12 % de „ne” en la kesto de voĉdonintoj) ol el atenta analizo de la koncepto de laikeco, kiu, laŭ iuj, tiukaze akiris la karakteron de

„ideologia laikeco”. La nombroj ŝajnas indiki, ke la furioza distingo inter laikistoj kaj klerikaluloj ne ekzistas nivele de la popolo.

## Iom da historio

Se ni etendas niajn rigardojn al la historio, la problemo pri la rilatoj inter ŝtato kaj eklezio havis variajn sortojn antaŭ ol atingi ekvilibran punkton per alveno de la liberaldemokratio. En la unuaj jarcentoj, la romia imperio fiksiĝis en la pozicio de netolera rifuzo pri la libera konfeso de la kristana kredo, leĝfarante por persekuti kristanojn, ĉar la kristana rifuzo rekoni la diecon de la imperiestro ŝajnis malstabiliga por la ŝtato.

Siaflanke, male, kristanoj respektis la ordinaran ŝtatan leĝaron laŭ la sampeca instruo de Jesuo. Prie oni legas en la Matea Evangelio, ke al fariseoj demandantaj, ĉu licas „pagi impostojn al Cezaro”, Jesuo respondis, indikante sur la monero la bildon de la imperiestro: „Redonu al Cezaro, kio apartenas al Cezaro”.

Sume, ŝtato kaj eklezio havas du malsamajn manierojn kaj celojn por alproksimiĝi, kaj trakti, al la sociaj kaj politikaj aspektoj de la homa realo. Tiel inspirite, la kristanaro de la unuaj jarcentoj opiniis, ke la fideleco al la evangelio estas spirite alterna rilate la agadon, kvankam partoprenatan de ili, en la ŝtataj institucioj, „sekularaj” pro ties tempa dimensio.

Asertas tiusence la „Letero al Diogneto” (grava dokumento de la fino de la dua jarcento): „Kristanoj distingeblas disde aliaj homoj nek laŭ teritorio, nek laŭ lingvo, nek laŭ moroj. Ili loĝas en siaj respektivaj patrujoj, sed vivas kiel landtrairantaj pilgrimantoj. Ili senescepte plenumas ĉiuspecajn civitajn devojn; sed ĉion ili konsideras laŭ fremdula vidpunkto. Kiun ajn fremdan teritorion ili konsideras sia patrujo: ĉiu patrujo por ili estas fremda teritorio. Ili travivas sian korpan vivon sur la tero, sed reale ili estas civitanoj de la ĉielo. Ili obeas la komunajn leĝojn, sed ilia propra vivo metas ilin trans la leĝojn.”

La persekutoj, kontraŭ kristanoj, daŭris ĝis la venko de Konstantino ĉe ponto Milvjo (en Romo), kie li kredis,

ke la venko lin favoris pro lia adhero al la krucoŝigno kies slogano diris: „*In hoc signo vinces*” (per tiu signo vi venkos). Konstantino, formulante la principon de la libero de religio (313 p.Kr.), proklamas la emancipiĝon de la kristanoj, kiuj ricevas la plenan titolon de imperia civitaneco. Estos imperiestro Teodozio, devota amiko de la milana arkiepiskopo Ambrozio, kiu per la edikto de Tesaloniko (380 p. Kr.) proklamas religio de la ŝtato la kristanisman kaj metos eksterleĝen la paganajn kultojn. En malpli ol unu jarcento realiĝis totala renverso de la situacio. Kaj tiel komenciĝas la potenco de la eklezio kun la praktiko de ia superregado de la pontifiko, eĉ rilate la figuron de la imperiestro.

Tiurilate la situacio en la komenco de la nova jarmilo konturiĝas kiel vera „teokratio”, nome absoluta povo de la papo rilate la tutan kristanaron. La grandaj papoj „teokrataj”, subtenantoj de la eklezia aŭtoritato eĉ sur la teraĵoj, estas Gregorio 7a, de la 11a jarcento, kiu elmetis la „*Dictatus Papae*”, nome la plej altan ordonaron, per kiu estas asertita kaj trudata la superregado de papo super ĉiu alia aŭtoritato; Inocento 3a, komence de la 12a jarcento, kiu konfirmas la perfortan submetadon de la herezuloj kaj precipe de la movado, ne nur pace varbanta kaj interalie paŭperisma, de albigensoj kaj spiritualoj; Bonifacio 8a, kiu per la buleo „*unam sanctam*” pretendas ke ĉiu homa individuo *devas sin submeti al la Roma Pontifiko*. Temas pri esprimo, kiun la sinsekva teologia doktrino interpretos kiel peradon por la ĉiela savo, kiun la eklezio praktikas rilate ĉiujn homajn kreaĵojn, kiuj adheras ekstere al la dia revelacio laŭ propra kono.

Historiistoj avertas, ke la du konfliktantoj invadis la kampon unu de la alia pli pro la neceso defendi siajn proprajn prerogativojn ol por limigi tiujn de la alia. Eĉ la papoj, invadante la alian kampon, tion ofte faris por protekti la prerogativojn kaj sendependecon de la lokaj eklezioj, kiujn la ŝtata povo multfoje uzis kiel sian grundon por enmeti en episkopecon personojn pli zorgantajn pri la aferoj de sia sinjoro ol tiuj de la tasko plikristanigi la popolon.

Tra senfinaj kontrastoj kaj luktoj, kiujn nun ni rakontus, se eblus rekonstrui la historion sen partianiĝi eĉ senvole, la diversaj funkcioj kaj respektivaj sendependoj de la du naturaj institucioj trovis akcepteblan ekvilibron. Influis favore al tio la ekpraktikado de demokratio kun la nova koncepto pri liberecoj kaj homaj rajtoj, ĉiam pli akceptataj en la modernaj ŝtatoj. Estus dirate, ke laŭ diversaj skoloj tiuj konceptoj estas idoj de la sama kristanismo, ĉar eĉ en la plej akraj kontrastoj ĉiam subkuŝis la distingo de la povoj, kvazaŭ ili estus pretaj pace realiĝi.

Vere la ideoj jam komencis iluminiĝi en la *Sumo* de sankta Tomaso (13a jc.), kiu, konsentante kun la helena filozofo Aristotelo (4a jc. a. Kr.), devenigas la legitimecon de la ŝtatoj el la natura leĝo, al kiu submetiĝu ankaŭ la ŝtata leĝfarado. Antaŭ tiu natura leĝo, ŝtato kaj eklezio troviĝas en la sama pozicio de dependeco. Laŭ li, koincidante ankaŭ en tio kun Aristotelo, ĉiu „pozitiva” leĝo sin fundamentas sur, kaj devas harmonii kun, la natura leĝo: ju pli pozitiva leĝo distanciĝas de la natura leĝo, des pli ĝi perdas la karakteron de leĝo deviganta.

Tia konceptaro pri natura leĝo kaj homaj rajtoj ĉiam pli disvastiĝis per klerismo, nereligia aŭ kristana, kaj ĉiam pli estos akceptata de la katolika eklezio, ol ĉe la unuaj kristanaj pensuloj. Eleganta diskuto estus, ĉu la pontifika ŝtato, kun la papo-reĝo, invadita kaj ĉesigita en 1870, estis vera teokratio aŭ nur la kombino en la sama persono de la du povoj, reale unuigitaj sed teorie apartigitaj.

La koncepto pri ŝtata laikeco, kiu floras en la moderna epoko, en ĝia korekta formulado koincidas ekzakte kun la tomista koncepto fundamentita sur la natura leĝo. Bedaŭrinde, la aktuala disvastiĝanta kontrasto pri la esenco de la ŝtata laikeco sin konstituas kiel formo de relativista subjektivismo, laŭ kiu ne ekzistas etika objektiva ordo, „natura”, kiel regulilo de la homa agado, sed nur la subjektiva volo de la individuoj. Tio eble remetos en diskuton la pasintajn interrilatojn kaj politikan ekvilibron.

Armando ZECCHIN

# Historio sen vualo de mitoj



Aleksander Korĵenkov

**O**rigine intencita kiel kurs-teksto por la Somera Esperanto-Kursejo (Jekaterinburg, 1998), *Historio de Esperanto* aperis, ĉe Sezonoj, kiel nepretenda verko. Ĝia aŭtoro Aleksander Korĵenkov, konata rolulo en la rusa kaj internacia Esperanto-movadoj, de jaroj kontribuas al la Esperanta kulturo precipe kiel eldonisto.

En medio fojfoje iom sekteca, en kiu individuoj tendencas diigi siajn elstarajn personojn kaj atingojn, bonvenas sobraj prezentoj de historiaj faktoj. Tiuokaze foresto de patosa tono kaj klopodo por objektiveco jam estas en si mem io atentinda. Jen la atutoj de tiu laboro de Korĵenkov: li provis, surbaze de sufiĉa nombro da dokumentoj, liveri al la leganto historion de Esperanto liberan de partia rigardo.

La libro, verkita en lingvaĵo lakona kelkfoje atinganta la randon de sekeco, estas kvazaŭ sintezo de pli-malpli ĉio grava aperinta pri la historio de Esperanto precipe en la 80a, 90a kaj nuna jardekoj. La sinteza aspekto akre reliefigas en la lasta el la 11 ĉapitroj, nome en *Post la falo de la Berlina Muro*: ĝi aperas pli kiel listo de okazintaĵoj post la kolapso de la socialismo en la Orienta Eŭropo, ol kiel his-

toria priskribo. Kontraŭvole verkita, kiel la aŭtoro mem nin sciigas en piednoto, la koncerna ĉapitro prezentiĝas tiel resuma certe pro prudento, alivorte, pro la risko de eraro, al kiu estas elmetita ĉiu, kiu sin ĵetas al la malfacila tasko historiografii pri sia tempo. Ekzemple, la organizita provo „agnoskigi la Esperanto-komunumon kiel objekton de internacia juro”, konata kiel la Esperanta Civito, estas pritraktita en nur du malgrandaj alineoj. Do leganto serĉanta prilumon pri tiu nebula projekto – almenaŭ kurioza el ideologia, politika kaj kultura vidpunktoj – plu restos en sia nescio. La ĉapitro *Antaŭ internaciaj institucioj* siaflanke estas mallonga prezento pri instituciaj sukcesoj kaj malvenkoj de nia lingvo, kun aparta atento al Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, eble la plej grava fiasko, pri kiu ni povas malfieri.

En malsama direkto, la grava kaj komplika „franca” aŭ „propaganda” periodo ricevis pli longan kaj detaloriĉan traktadon, same kiel la okazintaĵoj, priskribitaj en *Du gravaj jaroj: 1905-*

*1906, Ido-skismo kaj Serĉante organizan solvon.* Cetere, oni tie ne trovas la tiutempajn protagonistojn de intrigoj, disputoj kaj politikaj manovroj pentritaj per emociaj vortoj. Ĉi-foje do la „mistera” kaj „perfidema” de Beaufront estas prezentita kiel nura proponinto de reformita Esperanto (Ido) ĉe la Delegitaro por alprenado de lingvo helpa internacia, kiam li fakte devus defendi la Zamenhofan lingvon.

La senemocia tono tra la tuta verko atestas la deziron je objektiveco de la aŭtoro. Tamen, neniu idealo pri objektiveco aŭ ikonoklasta klopodo povas komplete senigi verkon je eraroj, kaj Korĵenkov asertas, surbaze de biografia eseo de la pola ĵurnalisto Ryszard Kraŝko, ke Zamenhof malsukcesis profesie pro manko de kuracista kompetento. Dubinda aserto sen apogo al dokumentitaj evidentaĵoj.

*Historio de Esperanto* ne havas la malkaŝigan karakteron de *La danĝera lingvo* de Lins, nek ties analizemon de faktoj kaj cirkonstancoj, sed ĝia aŭtoro bone dokumentis sian verkon (pri kio atestas la bibliografia listo kaj notoj) kaj povis kalkuli je provlegado kaj konsilioj de gravaj nomoj, interalie de Osmo Buller kaj Ulrich Lins. La malmultajn lingvaj malglataĵoj kaj preserarojn oni povus forigi por eventuala dua eldono. Tiu ĉi povus prezenti al la leganto nomindekson, aldone al la biografiaj notoj de kelkaj elstaraj nomoj de la Esperanto-komunumo, kiuj aperas en la fino de la verko. Tiu manko tamen ne igas la libron senvalora. Kontraŭe, finanalize ĉiu libro pli-malpli bona, aperinta sur la Esperanta merkato, estas io atentinda, se oni konsideras la kutiman mizeron de niaj rimedoj kaj la malkreskantan kvaliton de niaj kulturaĵoj.

Reinaldo Marcelo FERREIRA

Aleksander Korĵenkov: *Historio de Esperanto*. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2005. 127 paĝoj, broŝurita. ISBN: 80-8585-74-4

Prezo ĉe FEL: 12,00 eŭroj + afranko.

# Rakontoj neniam perdontaj sian legindecon

**L**a skota humorista verkemulo Saki (1870-1916) estas inter tiuj verkistoj, kies humuraĵoj estas ekstertempaj, egale legeblaj kaj amuzantaj, negrave en kiu jarcento. Nun ni havas dudekon da liaj noveletoj, en tre bona traduko, farita de Edmund Grimley Evans. Ĉiu el la noveletoj estas facile tralegebla dum unu sido, kaj ilia ĉefa karakterizaĵo estas iom da surprizo, plej ofte pro sia temo, kelkfoje pro la ludemo de la verkinto, kiu drole kaj senride prezentas scenojn tre vivŝajnajn aŭ ofte malfacile kredeblajn, tamen imagoplenajn.

Imagu, ekzemple, ke aŭtoro de romanoj sidas en sia komforta seĝo, verkante ĉapitron de sia sekva romano. Entrudas sin kolportisto de unuvoluma kompakta enciklopedio, kiu, laŭ lia insistado, informas plene pri ĉio. Li strebas konvinki la romaniston pri la nepra neceso posedi la enciklopedieton; la romanisto kontraŭbatalas per legado el diversaj siaj romanoj, donante detalojn, ne troveblajn en la enciklopedieto.

Aŭ supozu, ke vi estas romia imperiestro, festanta sian naskiĝtagon per publika spektaklo. Pripensu la bone konatajn prezentaĵojn en la romiaj cirkoj. Subite arego da virinoj interrompas prezentotan ĉarvetkuron per sia propra ĉirkaŭkurado en la cirkejo, tiel malebligante la prezentaĵon: ili estas fruaj protestantaj *suffragetæ*. Kiel ilin venki kaj daŭrigi la feston? Kion elpensas la imperiestro?...

Artisto famiĝas pro siaj pentraĵoj de gebovoj. Ili fariĝas furoraĵoj. Li klopodas pentri ankaŭ aliajn temojn, sed la kritikistoj kaj la publiko lin punas pro lia klopodo „trompi” ilin. Kion fari? Ĉu cedi? Ĉu baraktadi?


Ni vizitas zoon, progreseman zoon, kiu penas provizi al la bestoj „naturajn” pejzaĝojn, por doni hejmecon senton

al la animaloj. Ĉu eblas, tamen, plenumi tiun celon? Ĉi-rakonte Saki intence pensigas nin, indikante la maleblon imiti la veran ĉirkaŭaĵon de natura sovaĝejo. Sed eble ankaŭ ni mem vivas en kvazaŭzoo, eble?

Certa viro estas bone konata kiel tedulo; li komencas rakonti pri io, kaj ŝajnas, ke li neniam finos la rakonton. Kiam oni volas senigi sin je li, por povi trankvile legi aŭ pensi, aŭ dormeti, kion fari? La sinliberiga tekniko estas tipe Saki-a.

Ĉi tiuj rakontoj estas serioza literaturo, kvankam ili konsistas el humoraj anekdotoj. Serioza, kaj sukcesa, literaturo prezentas, iuforme, verajn (aŭ verŝajnajn) partojn de la ĉiutaga vivo, kiu restas senŝanĝa, negrave, en kiu epoko oni vivas, kaj uzas por tio ĉiutagaĵojn, egale neŝanĝiĝantajn dum la epokoj, tiel ke oni povas legi, ĝui, kaj spirite profiti, sen devo pene deĉifri la frazojn aŭ aludojn de la verkinto. La verkoj de Saki jam pretervivis jarcenton. Ili pretervivu multajn pli.


Donald BROADRIBB



Saki (H. H. Munro): *La lupino kaj aliaj rakontoj*. Tradukis Edmund Grimley Evans. Eld. la tradukinto; distribuas Esperanto-Asocio de Britio. 152 paĝoj gluitaj. ISBN 0-902756-24-9.

**Prezo ĉe FEL: 14,90 eŭroj + afranko.**

**La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO  
estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,**



Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Tif. + 32 3 234 34 00;  
tlk. + 32 3 233 54 33;  
rete: [eldonejo@monato.net](mailto:eldonejo@monato.net);  
skajpe [fel-monato](tel:3232343400)  
aŭ per [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

# Mitologiaĵo tre bele transdonita



sinnomantaj „mitologiistoj” kompilas vortarojn, eĉ enciklopedi(et)ojn de mitologio de la romia popolo, aŭ de la greka popolo, aŭ de la azteka popolo ktp. Preskaŭ senescepte tiuj kompilaĵoj rapide disvendiĝas, sed apenaŭ legiĝas pro siaj teda stilo, tro laŭvorta interpreto de idiotismoj aŭ parolfiguroj kaj kontraŭstarigo de abundaj variantoj de la pritraktataj „mitoj”.

Trege malofte en la moderna epoko literature lerta fakulo sukcesas reverki mitologian rakonton en formo

legebla, agrablastila, tiel ke oni ne nur plezuroplene legas ĝin, sed ankaŭ legas ĝin al siaj infanoj. Ĉi tiu verko, komence eldonita svedlingve, estas unu el tiuj tre raraj verkoj.

Igdrasil estis (kaj plu estas) la mondarbo. Pli precize, la kosmarbo; ĉar ni estas nur uletetetoj sur branĉo de tiu arbo, ni ne konscias, ke la mondo estas nur malgrandega parto de multe pli kompleksa kosmo, konsistanta el fraksenarbo, en kiu diversloke loĝas gigantoj, la supozataj dioj, monstroj kaj esenca sciuro, kiu per sia kurado de unu parto de la arbo al alia helpas la interkomunikadon de tiuj uloj.

*La frakseno Igdrasil* montras sin al ni kiel grandpaĝa libro, kies ĉiun paĝon plenigas desegnaĵoj, kutime apud iom da teksto, iom antikvastile faritaj, tiel ke la desegnaĵoj vidigas al ni la scenon, kiun preparolas la teksto. Pro tio la libron neeviteble tre ĝuos ri-

gardadi infanoj, dum laŭtleĝanto sonigos la tekston. Sed ne nur la infanoj. Ankaŭ ni, la ne-plu-infanoj, profitas el la ilustrado de alie iom sekaj vortoj. Kompreneble, ilustranto estas ankaŭ interpretanto, ĉar ĉiu leganto povas imagi por si proprajn bildojn de la uloj kaj eventoj. Edward Lindahl, tre talenta artisto sveda, enbildigis la rakonton de Alf Henrikson, tre talenta verkisto sveda. La rezulto estas literatura verko, kies enhavo, kompreneble, estas konigata al ni per la imago kaj mensbildo de nuntempuloj. Nu, preskaŭ nuntempaj: Alf Henrikson vivis en 1905-1955, kaj Edward Lindahl estas aŭ estis proksimume samtempa. (Serĉo per *Google* indikis nur svedlingvajn retejojn kaj la titolojn svedajn de diversaj libroj, ilustritaj de Edward Lindahl. Sed pri la ilustristo, nenion; kaj pri la verkin-to, nur liajn jarojn.)

Ĉu ĝi prave prezentas al ni la miton? Absurda demando! Neniu mito havas definitivan enhavon, unusolan „ĝustan” formon. Mitoj estas esprimoj de nia kompreno pri la naturo de la mondo, de la vivo, de ni mem. Pro tio ekzistas tiom da variantoj de mito, kiom estas da homoj, por kiuj ĝi havas signifon.

Henrikson kaj Lindahl sukcesis prezenti al ni la igdrasilan miton kiel pli-malpli koheran rakonton, laŭ sia propra koncepto. Sed multe pli, ili faris por ni artlibron, kiun (kvankam la bildoj estas nur nigra-blankaj) ni emas trarigardi por revidi la historion de la kosma frakseno. Miaopinie, ĝi estas trezoro de nia literaturo moderna.

Donald BROADRIBB

**M**itologio estas tre miskonduta besto. Ĝi kaŝas sin en popolaj diroj, en mencioj hazarde troveblaj en diversaj libroj, en popolaj rakontoj, ofte sinkontraŭdiraj, en proverboj; fakte, ĉie, escepte de publika sinmonro bonorda. Kelkafoje dum la historio verkistoj, ofte poetoj, sed ankaŭ rakontistoj, entreprenis prezenti temon el la mitologio en literatura formo. Tiel estiĝis *Kalevala*, diversaj historioj de doktoro Faŭsto, *Sagao de Njal* kaj pluraj aliaj mondkonataj literaturaj verkoj. Ankaŭ en antikva Grekio, iom post iom, per popola rakontado kompiliĝis poeziaj verkoj, titolitaj *Odiseado* kaj *Iliado*, kiujn la tradicio atribuis al iama poeto Homero, kaj kiuj post jarcentoj skribiĝis kaj atingis eĉ la rangon de sanktaj skriboj por multaj grekoj.

Tamen, plejparte mitologio estas nur partete rigardebla. Tial en la moderna epoko sennombra kvanto da

Alf Henrikson kaj Edward Lindahl: *La frakseno Igdrasil*. Tradukis Bertil Nilsson. Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 2005. 138 paĝoj binitaj. ISBN 91-85288-33-0.

Prezo ĉe FEL: 25,00 eŭroj + afranko.



LITOVIO

# Estiĝi la plej alta

**34-jara junulo Vaidotas Steponavičius el la litova banloko Druskininkai ne povis kontentiĝi pri sia alteco. Tial li havigis al si unikajn ŝuojn.**

**S**iajn novajn ŝuojn li ne povas meti en unu saketon. La ŝuparo ja pezas 7,72 kg. Li ĉiam portas ilin aparte. En tiuj ŝuoj estas malfacile marŝi. Ĉiu ŝtoneto aŭ iu malglataĵo tuj povas kaŭzi lian falon. Tial li kunportas ilin en du saketoj al ĉiu vizitata aranĝo, ekzemple koncerto, kaj serĉas tie trankvilan lokon por surmeti ilin. Sekve de tio li sukcesas iĝi la plej alta inter la homamaso.

La junulo asertas, ke li ekdeziris havigi al si la ŝuojn, post kiam li tralegis artikolon pri litova korbopilisto Arvydas Sabonis. La sportisto jam estis 220 cm alta, kaj la alteco de Steponavičius estis nur 187 cm. La junulo volis esti tiel alta kiel la populara sportisto. Li multe sportis, ĉiam maksimume etendiĝis. Tamen tiel li sukcesis kreski nur je unu centimetro. Tiam venis la ideo, ke li akiru almenaŭ ŝuojn, en kiuj li iĝus la plej alta homo en la lando.

Komenciĝis klopodoj tiucele. Unue la fraŭlo aĉetis ŝuojn. Poste li serĉis ŝuiston, kiu povus altigi la plandumojn. Pene li trovis unu, kiu komence penis konsili la junulon rezigni pri tiu ideo, sed poste konsentis. Kondiĉe ke tiuj ŝuoj estos la unuaj kaj lastaj en lia ŝuista praktiko.

La laboro daŭris ses monatojn. Por pretigi la ŝuojn, la majstro bezonis du-onsitelon da gluo, kiun li uzis por alfiksi 1,5 kaj 2 cm dikajn plandumojn. La ŝuisto aldonis dek ses tavolojn. Ĉiutage Steponavičius venis al la ŝufarejo por praktiki marŝadon. Ju pli altaj la plandumoj estiĝis, des pli malviglis la paŝoj de la junulo.

Kiam la ŝuoj fine estis pretaj, Vaidotas Steponavičius multe ĝojis pri tio,

en la ŝuoj li ja „elkreskis” ĝis 221 cm, je unu centimetro superis la faman sportiston kaj iĝis la plej altkreska homo en Litovio.

Laimius STRAŽNICKAS

*En tiuj ŝuoj Vaidotas Steponavičius estiĝis la plej alta homo en Litovio.*



## DONACKUPONO

**Donaco por via korespondamiko?**

**Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?**

**Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?**

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

**Ekzistas tri versioj:**

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEBLA

# Pliaj sudoko-enigmoj

Enigman libreton kun 80 diversaj sudokoj, kun ciferoj, sed ankaŭ kun diversaj alfabetoj, vi povas gajni, se vi solvos la ĉi-subajn enigmojn. Sendu la ciferojn, kiuj aperos en la kvadratetoj, indikitaj per A, B kaj C, antaŭ la fino de aŭgusto 2006 al la redaktoro de la rubriko: Jean Pierre VandenDaele, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ rete al [jp@fel.esperanto.be](mailto:jp@fel.esperanto.be).

A		2		8	1			4
8			4	9		5		
4		3				7	9	8
	8				5	6		
			6	1	4		3	
			3	B			2	9
9		4				2	C	
	5	7		3	9			
	6	8	5				7	

		6		2				
4	1			7	8		6	2
A	8			1			5	
	4	8						6
	7	3		5	6	1		
			7	B		5	4	
		4	9		7		C	
8	3		2					9
9			8			6		5

A		4						9
3			8				5	
		5		1	2		7	
							2	
		9		7	6	4		
	7		B		1	9		8
			1		7	2	9	
7		6	2		8	5		3
	5		3	6	4		1	C

## La paradizo: Solvo

### La paradizo

La gloran paradizon montras tri gotikaj pentraĵoj. De tiuj la unua laŭ donaco venis al nia muzeo, kies estro ĝin klarigis en bone aranĝita kurso. „Unue ni eksciis pri romano”, li diris kun emfaza nobleco, „kaj migru okaze novan vojon de historio longa laŭ libro, kiun ĉiu jam havigis al si. Mi ofte rakontas tiun fabelon, kiu estas interesa pro grava tezo. Komence la aŭtoro diras, ke dek ok oraj turoj ĉirkaŭas la paradizon, kiuj, kvankam el oro faritaj, ne brilas bele por o-kuloj de nia tempo. En la mezo de la ĝardeno fluas rivero, transe rokoj leviĝas, sude estas bela aleo, norde staras arbego, kies foliojn Adam prenas por kovri sin. Nun Dio volas provi la homojn. Li sendas tiucele fantomon aspektanta kiel serpento, antaŭ kiu Adam devas senti groteskan timon. Kain, lia knabo, vokas: ‘Ne falu, por ke ni povu resti ĉi-tie!’ Sed vana sonĝo! Eĉ Eva logas sian edzon per ruĝa pomo envolvita en freŝa folio. Kain diras al sia frato: ‘Mi timus oferi tian frukton; ĝi estos kulpa, se rompiĝos nia feliĉo kaj ni baldaŭ estos for. Mi konas tion!’ Sed Adam manĝis la pomon kaj nun nek la helpa volo de bonaj homoj nek atoma forto regajnos la paradizon.”

Tatjana Kulakova kaj Ann-Louise Åkerlund ricevos sudoko-libreton pro ilia solvo. Gratulon!

## ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko?** Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

**Esperanto-instruistoj:** vizitu [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Ĉio de vi por vi!

**Facilaj donacoj** por viaj korespondamiko: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL ([www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net)), kaj donacuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon\\_mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon_mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

IEK 2006

Internacia Esperanto-Konferenco



OSIEK  
<http://osiek.org>

en TIMISOARA, Rumanio, 15a-21a de julio

# Kio estas Oriento ?

postkonferencaj ekskursoj en la regiono

informoj, aliĝoj :

Eric LAUBACHER  
1, rue Bougainville  
78180 MONTIGNY-8x, Francio  
tel. +33 1 30 96 67 91  
kasisto@osiek.org

Maria BUTAN  
Aleea F.C. Ripensia n° 34 ap.3  
300585 TIMIȘOARA, Rumanio  
tel. +40 256. 464193  
fakso +40 256. 200296

LA ONDO  
DE ESPERANTO

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ  
27 EUR,  
30 USD aŭ egalvaloro  
ĉe UEA, FEL, ELNA,  
UFE, EAB, SEF kaj  
dudeko da aliaj landaj  
perantoj.

- \* Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- \* Tra Esperantujo
- \* Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- \* Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- \* Historio kaj kulturo de Esperanto
- \* Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- \* Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- \* Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

# Komencanto

[komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

## "Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 – Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: **15 eŭroj**

Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.

Abonu ĉe UEA aŭ via landa peranto

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

provizora retpaĝo: [www.Komencanto.narod.ru](http://www.Komencanto.narod.ru)

Poŝta adreso: KOMENCANTO, pk 132, Ekaterinburg, 620041, Rusio.

# www.retbutiko.net

## Vagu laŭplaĉe inter la verkoj de la Retbutiko.



**Kategorio**  
elektu la  
specon kiun  
vi deziras

**Kvanto**  
skribu tie ĉi la  
kvanton, se vi  
deziras mendi

**Bildo**  
kun fotoj de la plej  
gravaj verkoj



**Detaloj**  
pliaj detaloj  
kiel eldonjaro,  
paĝnombro,  
priskribo, ktp.

**Recenzo**  
legu recenzojn  
pri la verko

**www.retbutiko.net**

**1996-2006**  
**La retbutiko**  
**10 jara!**